




ENHAVO:

Januaro - 1999 - N° 21-a
ASTURIO

- 2....Nia Regiono
- 3...Iluzio
- 4...Mozaiko
- 5....Bezono de la Internacia
Lingvo tra la Historio
- 6...."El Pesadiellu"
- 7....Viruso
- 8....La Ruza Kato
- 9....Mesaĝoj
- 10-11.Pri Sudameriko
- 12..La Ŝafaro kaj la
Kampfloroj
- 13..Purupriki kaj la
Fruktvespertoj
- 14..Iam ĉe la Lignajisto
- 15..Amuzaĵoj
- 16..Zamenhofa Festo
En Gijono



**REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO**



Santa María del Naranco. Oviedo.

Estraro de ANTAŬEN :

Prezidanto: Nicolás Muñiz

Sekretariino : M^a Luisa Menéndez

Kasisto Luis González

Bibliotekisto: César García

Desegnisto: Císimo Rabanedo

Gekomitatanoj:

M^o José Álvarez Faedo

David Menéndez

Eva González

Gene Álvarez

Lisa Ejarque

M^a Isabel Murillo

Daise Murillo

Nia adreso:

Casa Municipal de Cultura
33400AVILÉS (Asturias)
Tfm^o 985 54 11 27

Subvenciita per la Registaro de la
Avilesa Municipo.-

NIA REGIONO


(Daŭrigo)

Oviedo havas dekdu Naciajn Monumentojn, kaj inter ili la plej gravajn ekzemplojn el la astura preromanika arto kaj interne el ilia unitariana fundo nuancas la malsamajn etapojn, kiuj korespondas al tri el la plej elstaritaj monarkoj de la astura regno: Alfonso II (792-842), Ramiro I (842-850), kaj Alfonso III (866-910). Tiu malriĉa monarkio ne nur realigas ĥimeran projekton pri alfontris la muzulmanan armeon, sed ĝi plie forgas arton kies florado ankoraŭ hodiaŭ rezultas neklarigebla.

La Sankta Ĉambro estas unu el la unuaj konstruaĵojn de Alfonso II, palaca kapelo, deponejo de sanktaj relikvoj alvenantaj al Asturio samtempe kiel la retiriĝo de kristanaj armeoj, reĉigitaj je la XII^a jarcento kune kun unu el la plej belaj eksponentoj el la romanika skulpturo : la Kalvario kaj la Apostolado.

La Redakcio.-

ILUZIO



Pianludu iomete, ludu iomete,
ĉar la harmonio, kiun el eburo vi eltiras,
flugigas mian frenezan penson
tra nubo el kolomboj blankaj.

Je la aŭdo de via ludo, ĉio ĝojas.
La etoso revas pri aromoj en la salono
Kaj tremas pro emocio via negra sklavino
Kiam, en la pokalon, al ni ŝi verŝas vinon.

Ĉio ridetas ĉirkaŭe. Ŝajnas,
ke la vivo vekigas kaj vibras
feliĉa kaj triumfa pro malĝojo...

Kie mi estas? Kie vi estas?...Amatino
Mi volas rigardi ĉion kaj mi vidas nenion
ĉar mi vivas en mondo, kiu ne ekzistas.

Verkis: *Luis Menéndez Lumen*
Tradukis: *M^a Luisa Menéndez*

• MOZAIKO •

Manĝilaro kun plumoj

En la XVI^a jarcento, la manĝilaro estis konsiderata per la franculoj kiel ina instrumento. La kialo estis ĉar la unua persono kiu uzis ĝin, Henri la III^a, estis inema.

Acra flarsenso

La amerikaj indianoj estis kapablaj flari la kadabron de iu ajn homo, ekde 16 kilometroj foren.

KAMELIO

Tiu ĉi arbusto el la tropika Asio estis klimatizata en Europo fininte la XVII^a jarcento per la jezuita Georges Camelli. Li, malgraŭ lia itala familinomo, Camelli, estis naskiĝita en Brün, Moravio, kaj li estis destinita kiel misiisto al la filipinaj insuloj. La studadoj el Zoologio kaj Botaniko al kiu sin dediĉis faris lin famkonata en Eŭropo tra la *Royal Society* de Londono. Sed lia famo longdaŭrais pli, tra liaj floroj, kaj pli ankoraŭ kiam Alejandro Dumas skribis “La Damo de la kamelioj”, kiu sin faris famkonata en la tuta mondo. Jam oni scias ke, la heroino de la dram-romano el Dumas, portis ĉiam bukedon el blankaj kamelioj, kiu ŝi ŝanĝis per aliaj ruĝaj unu semajno ĉiamonato

Daisi MURILLO
(Lernantino)



BEZONO DE LA INTERNACIA LINGVO TRA LA HISTORIO

(Daŭrigo)

V

La unua rezistanco kiu Francio trovis por doni al ĝia lingvo la kategorion de "oficiala" en la internaciaj rilatoj datumigas de 1753 (mil sepcent kvindek tri): je la Traktatoj por solvi la malakordojn sur la prezoj, la Francaj komisiuloj resendis al la Angloj lian memorandon, ĉar ĝi estis skribita en la Angla lingvo, kaj ili postulis ke la tuta negociado okuris en la Franca lingvo. Ili asertis ke la privilegia pozicio de la Franca lingvo estis establita ankaŭ jure pro ĝia longa uzado en la diplomatika praktiko. La Brita registaro sendis instrukciojn al siaj reprezentantoj el Parizo, en kiuj ĝi diris ke, pro gentileco, li ĉiam aldonis al la Anglaj memorandoj Francan tradukon, sed la Francaj senditoj trovis erarojn en la traduko. Do, la Anglaj senditoj ricevis ordonon por uzi nur la Anglan lingvon en estonteco. Ĉar nun Francio postulis la uzon de la Franca lingvo kiel rajto, la Brita registaro opiniis ke, la akceptado de ĝia uzo sub ties kondiĉoj signifus krei, fakte, precedencon kaj akcepti la uzon de la Franca lingvo kiel rajto, aldonante:


Ĉiuj la nacioj havas la rajton por rilatigi per neŭtrala lingvo. Kiel tio, oni uzas la Francan lingvon en la traktatoj kun la princoj de la Imperio kaj kun aliaj potencoj; se la kortego en Versailles opinias ke ĝi estas oportuna pritrakti kun Lia Reĝa Moŝto en la Latina lingvo, la Reĝo akceptos la bonan volon... La Reĝo malimplicite ordonas ke vi ne akceptos, en estonteco, dokumenton el la Francaj senditoj skribitan en lia lingvo, se ili ne volas ricevi la respondon en la Angla lingvo.¹

Je 1800 (mil okcent) la kortego de Sankto Jaime enmetis praktikon por interrilati en la Angla lingvo kun la akreditataj diplomatoj, anstataŭ la Franca lingvo, kiu jam antaŭe estis uzita preskaŭ ĉiam kaj ĉie. La kutimo enradikis kaj la Brita Registaro uzis la Anglan lingvon plus ĉiufoje por siaj komunikadoj kun aliaj registaroj.

Por la fortikaĵo de la pozicio de la Angla lingvo ege kontribuis la kreskanta influo de Usono. Kiam ĝia monda povo pli kreskis, ankaŭ pli kreskis la gravecon de la Angla lingvo.

Maria José Álvarez Faedo

¹ Satow, Sir Ernst, *A Guide to Diplomatic Practice*, tria eldono, korektita de H. Ritchie, Londono, 1932, p.54.



“EL PESADIELLU”

“La pezaulo” estas mita astura ento, kiu aperas nokte. Li estas malbona estulo, kiu interrilatigas kun la demono, kaj por liberiĝi el li, estas necese preĝi, alvoki la nomon el Dio aŭ montri iun kristanan simbolon. Lia pli ofta manifesto estas speco de grandega pezo, kiu similas konsterni tiun kiu suferas lin.

aperas sub kapra pligrandigas lian akiras la aspekton mano, tre forta kaj presentiĝi en la vojoj.

Junulo iris poste li diris ke li ne la diablo. Kiam li iris senti grandan pezon, li alvenis al sia domo, li marŝis kun paŝoj tre malgrandaj. Li enlitiĝis kaj la pezo persistis, la lito oscilis kun li. Lia patro sensis ĝin ekde alia ĉambro kaj li demandis: Kio okazas? Ĉu vi fartas bone?

Li estis la “Pesadiellu”, kaj la junulo preskaŭ mortiĝis de timo pro troe paroli.



De tempo al tempo, li aspektas kiu foje pezon kaj laŭokaze li de grandega homa lanughara. Li povas domo aŭ sur la

iam amindumi, havis timon nek al

apud fonto, li komenciĝis ne povis vojiri. Kiam li

Ludoviko.-

(Lernanto)

VIRVUVU

Ili alvenis maskovestitaj, kiel viruso de nevidebla ĉeesto. Ili luktis pro justa kaŭso: nova mondo, postvivi. Ili alvenis, koloniis, oni instaligis efike sur iliaj propraj elkreskraĵoj. Ĉio kion ili estis kapabla por putrigi, avidmanĝi, eldetru, servis al ili, kiel fundamento por konstrui ilian hejmon.

Ili venis de loko kie la nokto kampadas sur la necesa laboro pri fariĝi homo, iluminita per la lumo el la somero, poste printempo plena el fido kaj pieco. Ne havis koloron la ludoj de ilia infaneco. Ilia adolesko estis ludo por lerni mortigi.

Kaj kiel infanoj, kruelege senpekaj, ili putrigis, avidmanĝis, eldetruis, kopulis kaj oni multobligis. Ili kreis "Grandan Landon"; trabofirmigis, sur landlimaj kadavroj poste fratomortiga duelo, bukedo el steloj sur sanga pecvestaĉo, sango rektalinia de abomeninda urĝeco. Ili serĉis la efikon, kiel viruso. Kaj instaligis, rapide kaj firme, fortigitaj en la vertico de la piramido kaj de tie ili lasis ruliĝi iliajn elkreskaĵojn, facila fluo, ĝis la hejmuloj de la "Plebaj Suburboj".

Ilumiitaj alkemiistoj, ili konvertis en oro ĉio kion falis en iliaj manoj: petrolo, silicio, uranio...Loĝantoj de mondo, kiu adoris la monon, ilia povo kreskis samtempe ke ilia avareco estis himno por propagi. Krenelaj mutacioj, nevenkeblaj muroj, modernaj armiloj...Oni estiĝis nevenkeblaj, kiel morta viruso.

Kiel morta viruso, ili infektis la teron, la akvon, la aeron, kaj oni konvertiĝis en la mastroj kaj sinjoroj de la fajro, ilia nura potenciala malamiko. Ili infektis la vivon; kontaĝis hepatojn, pulmojn, korojn...Precipe ili kontaĝis cerbojn, starigis la ideon de la Ununura Penso en la Globusa Vilaĝo. La penso, nur ilia penso, pli valoriĝas kiu pli havas, asfalta predulo, ludi nur por gajni. La vilaĝo estas teritorio kiun ili konkeris, absoluta vasaleco, tera submitigo, ununura universala destino...Ili alvenis kiel viruso: de ne videbla ĉeesto ilia masko.

DAMEGO

LA RUZA KATO

La kato "Misy" ĉiutage pasiĝas en la lernejo "Asturamerica"
Antaŭ jaro kaj duono kato en "Cudillero (Asturio)" iras al la lernejo kie ĝi ravas la infanojn, kiuj amegas ĝin.

Dume la instruistoj intencas serĉi por "Misy" –nomo kiun la lernantoj donis al la kato-lokon pli taŭga pro ĝiaj trakurataĵoj.

La popola muso de biblioteko rivalon en la lernejo lerta kaj scioplana kiel specio. Gi estas

koloro kateca kiu duono plenumas la

Unua lakta manĝado enamiĝis al la loko ĝia domo por iri al la infanan amikecon konsideras ĝin kiel gvatis la infanoj kaj jam prenis el ne gravas ĝi partoprenas la ludkorto.



havas katan "Asturamerica", neniun alia el ĝia "Misy" cinamadekde jaro kaj lernejan horaron. faris, ke Misy kaj ĉiutage ĝi lasas lernejo. Li serĉas la kiuj amegas ĝin kaj talismano. Misy vespermanĝetojn de la tornistro sandviĉon, sed ludojn kun la infanoj en

La instruistoj sentas ili ĝenaj kun la presenco de Misy en la lernejo ĉar ili tage devas serĉi la katon tra la klasejoj antaŭ fermi for forige ĝin. Ili jam kontaktis kun Societo Protektanta el bestoj sed ili diris, ke nenion povas fari. La kato Misy presentigis ĝustatempe je la horo malfermi la lernejo. Ĝi estas feliĉa en la lernejo.

Niko



MESAGĜOJ

Ni komencas la eldonajn de nia revuo n^o 21^a, gratulante la novjaron 1999^a al ĉiuj el niaj letergeamikoj kaj kunlaborantoj. Ili donas grandajn animojn al nia konstanta laboro, favore, al la disvolvado de Esperanto.

Niaj gesamideanoj, kiuj apartenas al "La Astura Esperanto Asocio" de la najbara urbo el Gijon, invitis al nia grupo por celebri, ĉi jare la Zamenhofa-feston 1998^a. Ni pasigis, kune, tre memorindan datrevenon.

Ŝajne, ke la vorto "ANTAŬEN" estas akceptita per diversaj grupoj de geesperantistoj de la t.m.. Ni ricevis la almanakon de Informilo "ANTAŬEN" eldonita en Ĉeĥa respubliko per la grupo de "handikapuloj", kiuj apartenas al la Internacia Klubo de A.E.H. Do, ni jam konatiĝis kun diversaj grupoj kiuj funkcias kun la mem vorto

Per nia franca leteramikino G. Gabillon, ni ricevis la programon de la fama "Kvinpetalo", de Esperanto Centro, kiu funkcias en Bouresse-Francio. En tiu programo partoprenos tre kapablaj geesperantistoj, inter ili, dum la monato julio, nia tre bona amiko Miguel Fernández, kiu prelegos pri "La hispana poezio".

● *****

La juna grupo de geesperantistoj, kiuj loĝas en Siberio, petas korespondadon kun gesamideanoj de la tuta mondo. La respondo estas garantita.

Adreso: Rusio 626440 "Niĝnevartovsk - 6"

Str.60 let Oktjabrja 6 -135

Interklubo "E-to"

PRI SUDAMERIKO

Se vi pensas pri Sudameriko, kio unue venas al via kapo?

Al tio pluraj homoj respondis, ke venas ĉiam vivaj koloroj, la koloroj de la pejzaĝo kaj la ĉielo, la koloroj de la teksaĵoj kaj la rustikaj artaĵoj kaj manfaritaĵoj de tie. La pentraĵoj, la potoj, la korbaro kaj juveloj el oro, arĝento kun ametistoj, malakitoj kaj turkisoj.

Kiam mi memoras pri Ameriko, min unue kaptas la sonoj de muziko. Ĉie kaj ĉiam muziko. La tutritmaj rumbo kaj salso*, la elegantaj movoj de tango, la fajnaj sonoj de la andaj muzikiloj kaj la samboj de la plenkolora Brazilio en Karnavalo. De la vasta kaj sunoplena marbordo atlantika ĝis la altaj pintoj de la Andoj Sudameriko estas teritorio, kie vibras la sonoj de varia muziko.

Sudameriko estas nenie pli abunde riĉa ol en la vasta gamo de muzikiloj, kies eklektika deveno interplektas la indigenaj antaŭ-Kolumbajn kulturojn de la Inkaa Imperio kun eŭropaj kaj afrikaj influoj.

uvarillo Kelkaj muzikiloj senĝange travivis pli ol 900 jarojn, kiel ekzemple kenao, speco de ŝalmo, kiun origine oni produktis el bestaj aŭ homaj ostoj. Poste ĝi estis fandita el oro aŭ arĝento kaj hodiaŭ oni faras ĝin el sukerkano. Ĝin ni trovas en la montaraj regionoj de Peruo, Bolivio, norda Ĉilio nordokcidenta Argentino. Ĝi havas 5 aŭ 6 truojn kaj ĝin oni ludas por akompanadi kantojn kaj dancojn. En la folkloro de la andaj paŝtistoj oni ludas ĝin por inspiri amon.

Iom pli longa estas kena-kenao, kiu estis konata proksimume en la 16-a jarcento de la ajmara popolo ĉirkaŭ la Lago Titikaka en Bolivio. Tradicie ĝi estis ludata por laŭdi la ĉielon.

Alia indigena muzikilo estas la tiel nomata *pututu* uzita de inkaoj en ties ceremonioj. Hodiaŭ ĝi estas farita normale el kornoj. Ties mallaŭtaj sonoj en kombino kun la ritmoj de kenaoj estas taŭga maniero por esprimi de melankolio.

Inkaj speciale ŝatis lerni kaj uzi la muzikspecojn kaj muzikilojn de la popoloj kaj kulturoj, kiujn ili aneksis al la Imperio. Tio okazis kun la tiel nomata *cha'jchas*, muzikilo farita el kapraj ungoj, venanta origine el la hodiaŭa Bolivio. Cetere, hispanoj kaj portugaloj ankaŭ influis muzike en Sudameriko alportante diversajn sonojn kaj ceremoniojn el Eŭropo kaj Okcidenta Afriko

Kordmuzikiloj estas notinda importaĵo el Eŭropo, kiu en Ameriko adoptis proprajn karakterizaĵojn. Klara elmondo de tia miksitaĵo inter la eŭropa kaj indiĝena kulturoj estas la ĉarango, jam uzata en la 18-a jarcento en la boliviaj Andoj. Ĝi estas malgranda, iom simila al hispana liuto, sed kun malpli da kordoj. Unuflanke ĝi estis ludita ofte en kamparaj regionoj kiel parto de la ceremonioj por la besta fekundeco, aliloke ĝin oni ludis por la kortegaj dancoj. La dorso de la muzikilo estas farita el dazipa kiraso.

Aliaj muzikiloj estas la tiel nomata *bandurria* (aŭ *mandurria*), hibrido de gitaro kaj citro. Ĝi unue estis konata en Kubo, Gvatemalo, Kolombio kaj Ĉilio kaj ofte ĝi estis parto de terceto kune kun harpo kaj la eksterordinara berimbao. Se foje tri kulturoj kune miksiĝas en muziko estas ĉi tiam: birimbao estas brazila muzikilo el afrika deveno, harpo el Eŭropo kaj *bandurria* el Ameriko.

La plej eksterordinara afero estas, ke la muzikiloj estas ankoraŭ hodiaŭ faritaj en la samaj regionoj ofte de la samaj familioj, kiuj tian kapablon heredis de generacio al generacio.

Gaitas estas faritaj, ekzemple, en suda Kolombio laŭ la sama metodo kiel dum plurjarcentoj. *Gaita* estas blovmuzikilo kaj pli specife speco de sakŝalmo, kies tuboj estas faritaj el kakta lignaĵo. Estas 2 tipoj de *gaitas*, vira kaj ina. La lasta havas 5 truojn kaj la vira 2 kaj oni ĝis ludas per unu mano kaj per la alia iu *maraca* estas skuata.

Kolombio estas unu el la landoj kun plej variaj muzikiloj. Ĝi parte kuŝas ĉe la Karibea maro, parte ĉe la Pacifiko kaj havas altajn montojn, ĉio tio donas grandan varion al la spektro pri muzika produktado. Kolombio estas la lando de la marimba, muzikilo veninta el Afriko en la lasta jarcento.

Malgraŭ tioma varieco, daŭre por multaj homoj la sonoj per kiuj oni rekonas Amerikon estas ĉefe tiu de "antares" de la keĉua popolo de Peruo kaj de la kenaoj, ofte akompanataj de tamburegoj, duobla tamburo, kaj de 10-korda gitaro.

Atilio Orellana Rojas
Argentinio / Nederlando

La ŝafaro kaj la kampfloroj



La fulmoj disigis la nubojn.

La ŝafistoj timiĝis,
pri la ŝafaro pensis,



kaj el paŝtkampo
kie ludadis ĝi kun la kampfloroj
ĝin kolektis.



kaj en stalo ĝin alportis
sub la tegmenta ŝirmo,
en la varmo de ligna fajro,
buŝe en manĝuja hordeo.



Neniu pensis pri la kampfloroj.
Ili restis malvarme, ekstere,
ricevanta la trafoj de pluvaj gutoj
sur petalojn,
gutoj kiuj falis kiel larmoj
kaj akviĝis la radikojn
kun la akvo de sufero.



Ankoraŭ novan senfulmi tago.
Al sunlumo la vizaĝojn altigis la floroj,
kaj la ŝafaro vekiĝis el la stala varmo
grasigita de manĝuja hordeo
kaj malĝoje piediris al granda palaco
kie eniris sed ne foriris.



Kunlaboranto: *Joe Camilleri.*
Malta.-

PURUPRIKI KAJ LA FRUKTVESPERTOJ

Antaŭ ol la Lakta Vojo, tiu glima lumgalaksio, formis arkegon trans la firmamento, ne estis vojoj sur la ĉielo.

Sur la tero, la praloĝantoj estis kontentaj kaj feliĉaj. Ili pasigis la taglumajn horojn, kolektante la abundajn manĝaĵojn el la arbaro kaj ĉe la marbordo. Vespere, ili ritmi kantis kaj faris ceremoniojn ĉirkaŭ la nokta fajro. La plej fama kantisto kaj aktoro de la tribo estis Purupriki (pr.púrurpíki) kaj la kantoj, kiujn li ritme muzikis, estis liaj propraj kreaĵoj.

Venis tago, kiam la viroj de najbara tribo vizite alvenis por vidi la prezentaĵojn de Purupriki. Tiun vesperon ili pasigis multajn horojn, festante, dancante kaj kantante kaj postan matenon, en la densejon. Ili kolektis manĝaĵojn por tiunokta festo.

Atendinte preskaŭ ĝis la tagiĝo, Purupriki ŝtelpaŝis tra la mallumo de la manglarbaj marĉoj. Li ĵetis sian bastonon en fruktvespertoj ripozis. Koleraj pro la arbon, kie svarmo da sur Purupriki-n kaj brusvingante la atako ili falflugis flugilojn, portis lin tra la malklaraj koridoroj de la manglarbaj marĉoj en la firmamenton.

Rigardante supren, la praloĝantoj vidis, ke Purupriki estas portata ĉielen de la multego da fruktvespertoj, kiuj treniĝis malantaŭ li kiel luma vojo. Dum la viroj aŭskultis, ili aŭdis la dolĉan voĉon de sia plej amata kantisto, kiu sonigis sian adiaŭan kanton.

Tiun nokton, la tribanoj dancis kaj ritme kantis la adiaŭan muzikon de Purupriki. Sur la ĉielo, teren rigardante al la viroj, kiuj honoris lin, estis Purupriki. Li estis tiu brila stelo, Antareso, kaj trans la firmamenton etendiĝis la fruktvespertaro, transformita en tiun brilegan spektaklon de la nokta ĉielo, la Lakta Vojo.



Tradukita de *Jill Mason*, Brisbano

Kunlaborantino : *Jenifer R. Bishop*

IAM ĈE LA LIGNAJISTO



Iun nokton, dum Petro, la lignajisto dormis supre, okazis stranga kverelo en lia malsupra laborejo.

Ĉiuj iloj ribelis kaj per malĝentilaj vortoj, ili grumblis unu kontraŭ la alia.

Unue, la martelo, por montri sian potencon, frapis 3 foje kvazaŭ kritikis la segilon, kiu scias nur knari kaj grincigi la dentojn de aliaj.



La tenajlo admonis la najlojn, dirante, ke se ili malbone truas la lignon, ĝi tuj elŝiros ilin kaj forĵetos en rubujon.

La rabotilego, longa kaj eleganta primokis la rabotilon, sian kuzon, tro malgrandan por agi efike.

La raspilo kaj la limilo interbatalis: ĉiu volis esti la plej taŭga por forigi de la ebena tabulo la malglataĵojn.

Resume, ĝis la fino de la nokto, bruoj, insultoj, mokaĵoj regnis en la laborejo de Petro.



Matene, tiu ĉi vekiĝas kaj kompreneble estas preta labori ĉar tasko atendas lin.

La iloj troviĝas en kutimaj lokoj kaj aspektas trankvilaj. Petro scias nenion pri la noktaj disputoj. Unu post la alia, li uzas la ilojn, kiuj ŝajnas obeemaj en liaj spertaj manoj,



La segilo bone tranĉas la tabulon por fari malgrandajn pecojn facile manuzeblajn.


La rabotilo puŝita de forta mano, iras kaj reas por glatigi la lignon dum rabotaĵoj falas teren kvazaŭ bukloj de blondaj haroj.

La martelo, kadence, frapas por ke najloj bone kunigu partojn de la laboraĵo. Se, hazarde, iu maltrafas la vojon, tuj la tenajlo delokas ĝin.

La raspilo forigas kelkajn malglataĵojn.

Resume, ĉiuj iloj, gvidataj de la lignajisto, laboras harmonie por fine, miraklo, krei belan mebleton.

Tiam, Pietro fieras. Rideto sur la vizaĝo montras, ke la plenumita tasko plezurigas lin. Ankaŭ la iloj ĝojas; ili tute forgesas la malbelajn noktajn travivaĵojn.



Post komuna laboro, ili sukcesis fari belan lignaĵon, jen mirinda rezulto, ĉu ne?

La ila milito estas for.

Same kiel lumas ĉielarko post fulmotondro, la paco radias sur la laborejo de Petro, kie ŝvebas bonaodoro de arbaro, de tiuj pinarboj eble venintaj de fora Finnlando....

Kunlaborantino: **Fernande Terral** (Francio)



Amuzajoj

CISIMO



Tri knaboj estis punitaj pro diferencaj kaŭzoj. La deĵoranta instruisto demandis al ili kiuj estis la kialoj.

-Mi faris bruon dum la leciono, konfesis la unua.

-Mi interbatiĝis dum la paŭzo, klarigis la dua.

-Mi nenion faris, asertis la tria.

-Kial vi do ricevis la punon, miras la instruisto.

-Ĉar mia patro nekorekte agis.

-Kion li faris?

-Miajn hejmtaskojn.

Sylvia Kamalainen FINNLANDO

-Kiel fartas via filino?
-Bonege! Ŝi edziniĝis al bona junulo. Li helpas al ŝi kuiri, lavi la vazaron, zorgi pri la infanoj...
-Kaj via filo?
-Ho, li havas malfeliĉon. Ŝia edzino estas terurega. La "knabeto" devas kuiri, lavi la vazaron kaj prizorgi infanojn.

Ivan Varjuhin RUSIO

-Ha, saluton! Jam delonge mi ne vidis vin..
-Normale!.. Mi estis en prizono pro konfidekspluato, ĉantaĝprovo, toksosakro, ktp. Feliĉe mi plenumis nur tri monatojn, ĉar mi deaŭncis tri kunkulpulojn.
-Ĉu vere?
-Vorton de honoro!

Santiago Mulas HISPANIO

JUGISTO: "Mi rimarkas ke vi ŝtelis ne nur cent dolaroj sed ankaŭ multe da ringoj, horloĝoj kaj juveloj"
LA AKUZITO: "Jes sinjoro". Mi memoris ke la mono sola ne portas la feliĉon.

Patricia Harkin AUSTRALIO

EN LA BROKANTEJO
Gabrovano intencis meti surtomban memoradon al ŝia bopatrino.
-Ĉu vi havas ion belan, sed ne multekostan?
-Estas unu, sed sur ĝi estas gravurita alia nomo.
-Ne gravas. Mia forpasinta bopatrino ne scipovis legi.

Valentin Georgiev BULGARIO

PETAĴO

Mi petas humoradon el diversaj landoj por publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)
Sendu al:

CISIMO R. SIMON
c/ La magdalena nº 26 - 1º D
C.P.33400 - AVILES
ASTURIAS - ESPAÑA



ZAMENHOFA FESTO 1998.

Altestimataj geamikoj kaj gesamideanoj :

Ankaŭ ĉi tiu jaro, kiel

kutime, la esperantistoj en la tuta mondo celebros la 139n datrevenon de la naskiĝo de Dr. Zamenhof, iniciatinto de la internacia lingvo Esperanto. La Astura Esperanto-Asocio celebros ĝin laŭ la jena programo:

Dimanĉo 20a de decembro:

12:00 ĥoro Oferado de florbukedo en la strato Esperanto.

12:45 ĥoro Sankta Meso en Esperanto (Preĝejo Sta. Nikolao)

14:30 ĥoro En la salono de la restoracio "Mesón Valverde", prelegos la prestiĝa kantabra samideano Miguel G. Aduriz kaj sekve okazos la tradicia bankedo

MENUO

1e Supo el marbestoj (Sopa de marisco)

2e Miksita Paeljo (Paella mixta) aŭ Raguo (Menestra)

3e Rostita Ŝafido (Cordero al horno) aŭ Lumbaĵo (Solomillo)

Deserto; pano; trinkaĵoj kaj "glasetoj da likvoroj" Prezo 1.600. Esp.

Postre; pan; vino o agua y "chupitos de licores"

Interesaj adresoj: Estrato "Esperanto": Kvartalo el Coto

Preĝejo "Santa Nicolao": Antaŭ strato Esperanto

Restoracio "Mesón Valverde": Hejoo, 42 (Apud la preĝejo)

Okaze de ĉi tiu evento, ni ĥavas la plezuron inviti vin partopreni la programon kaj ĝui kun ni agrablan kaj fratecan tagon. Astura Esperanto-Asocio gratulas kaj deziras al vi ĉiuj, gajan kaj feliĉan Kristnaskon kaj sanan, pacan kaj prosperan Novan Jaron 1999a.

Telefonaĵoj por sciigi al ni vian ĉeeston : 985 34 37 30 aŭ 985 36 29 42. Bonvolu komuniki ĝin antaŭ ol la 15a de decembro. Dankon!